

Esperanto en Svislando, 12-a parto
La unua esperanto-renkontiĝo en germanlingva Svislando
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 449, 1972.05.17 19

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum prelegaro ni prezentas al vi historieton de la esperanto-movado en Svislando helpe de tekstoj, kiujn ni ĉerpas el la revuo *Svisa Espero*.

A.- La unua renkontiĝo esperantista, kiu okazis en germanlingva Svislando, estas la tria Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo. Ĝi disvolviĝis en Lucerno la 23-an kaj 24-an de septembro 1905.

Cl.- En tiu kunveno oni devis preni du gravajn decidojn. Unue oni devis akcepti aŭ ne akcepti la *Deklaracion pri Esenco de Esperantismo*, kiu estis adoptita de la Bulonja Universala Kongreso de Esperanto. Due oni devis respondi al la invito aranĝi en Svislando la duan Universalan Kongreson de Esperanto.

A.- La Deklaracio de Bulonjo bone difinis, kio estas Esperantismo, Esperanto kaj Esperantisto. Laŭ ĝi :

Cl.- « La **Esperantismo** estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu « ne enrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn », donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure **privata** por kiu la Esperantismo ne respondecas. » (Fino de la citaĵo).

A.- Post tiu unua paragrafo, dua konsilas al « la amikoj de la ideo de la Lingvo internacia » forlasi ĉian « teorian disputadon » kaj grupiĝi « ĉirkaŭ la sola lingvo **Esperanto** ».

Cl.- La tria paragrafo diras, ke « Esperanto estas **nenies propraĵo**, nek en rilato materiala, nek en rilato morala. Materiala mastro de Esperanto estas la tuta mondo kaj morala mastro la plej talentaj verkistoj de tiu ĉi lingvo ».

A.- La kvara paragrafo diras, ke « ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia Esperantisto, karakteron absolute **privatan** kaj por neniu devigan. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo **Fundamento de Esperanto** en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon. »

Cl.- La kvina paragrafo diras, ke « Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. » Apartenado al societo estas rekomendinda, sed ne deviga.

A.- Tiu Deklaracio, kiun ni resumis, konkludas periodon de la esperanto-vivo, kiu komenciĝis en 1894 per la voĉdono malfavora al reformoj fare de la abonantoj de la gazeto *La*

Esperantisto. Nun estas decidate ĉesigi unu fojon por ĉiam la eternajn prilingvajn diskutojn, kiuj senĉese renaskiĝis en iuj rondoj esperantistaj. Kiuj volas transformi Esperanton laŭ personaj deziroj, tiuj agu kiel ili volas, sed ili ne plu sin nomu Esperantistoj, kaj la Esperanto-societoj ne plu akceptu ilian kunlaboron en la propra interna vivo. Jen tre resume la celado de tiu Deklaracio.

Cl.- En la Ĝenerala Kunveno de Lucerno tiu Deklaracio estis unue legata en Esperanto, sed poste la prezidanto Friedrich Schneeberger devis ĝin traduki germanen, ĉar granda parto de la germanlingvaj ĉeestantoj ne sufiĉe bone komprenis Esperanton, por povi partopreni la voĉdonon. Poste unuvoĉe la ĉeestantoj akceptis tiun gravan deklaron kaj sinjoro Hector Hodler estis komisiita « *verki leteron al D-ro Zamenhof por sciigi lin pri tiu akceptado* ».

A.- La dua diskut-punkto havis pli praktikan aspekton. Ĉu ni estas sufiĉe fortaj por inviti la duan Universalan Kongreson, kaj en kiu urbo devus okazi tiu kongreso? Jen ni legas al vi el la protokolo, kiu aperis en *Svisa Espero* de decembro 1905, la paragrafon, kiu resumas tiun programon :

Cl.- « *Ĉefa afero de l' kunsido estas la projekto pri la proksima Esperantista kongreso. S-ro Schneeberger diras ke la kongresanoj en Boulogne proponis kunveni sekvantan jaron, ĉu en Anglujo, ĉu en Svisujo. Plimulto preferis Svisujon pro ĝia centra situacio en Eŭropo. Tial la komitato de S.E.S. decidis en sia kunsido proponi al la anoj de S.E.S. inviti la Esperantistaron en Svisujo por 1906. Estas necese havi nun tiun decidon kaj poste oni elektos la urbon mem. S-roj Cart, Borel kaj Privat apogas varme tiun proponon, kiu estas akceptata. S-ro Hodler legas leteron de l' Ĝeneva Esperantista Grupo kiu volonte organizos la kongreson kun la helpo de l'junaj Ĝenevaj samideanoj. Letero estos do sendata al la Centra Internacia komitato por inviti ĝin oficiale.* »

A.- Post tiu grava decido la kunvenantoj komencis la tagmanĝon. Sinjoro Schneeberger malfermis tiun novan programon tostante je l' nomo de Svisa Esperanto-Societo al ĉiuj gastoj, « *rekomendante al ili la buŝan uzadon de Esperanto* ». Kaj oni legas en tiu kunvena raporto :

Cl.- « *Gaje oni sekvas kaj obeas la konsilon de nia prezidanto kaj nur malmulte oni aŭdas naciajn lingvojn ĉu germanan ĉu francan ; ŝajnas esti Esperantujeto.* » (Fino de la citaĵo.)

A.- Dum la posttagmezo la kunvenantoj promenis ĝis vidpunktejo, kie aŭdiĝis diversaj tostoj kaj prelegetoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !